Rynek - en matena lumo
(Rynek – reggeli fényben)

Ankorau cheestas
disshiritaj paperoj de l' nokto,
antautaga restajho de la homoj.
La matena venteto
florpetalojn flirtigas super ni.
Malantau la domoj de la oldurbo
lante helighas
la chielo.
Kato etendas sin.
Hundo kuras sur trotuar-rando.
En la mallarghajn stratetojn
ne ensalutas ankorau
la lumo.
La chiam pli palighanta lampo
super la Fusyek kaj la Bazylisek
citas memoron de frumatena fermo.
Pli fore estas shlosita ankau
la pordo de l' Senatoro.
Antau ghi floroj
sur siaj petaloj
cindrokoloras la vaporeto.
Kiam estingighas
la strataj lampoj
kaj ekbrilas sur la akvo
de Syren-statuo
la sunradio,
vekighas la urbo.
L a disjhetitajn panerojn
beke levas la unuaj kolomboj
de la mateno.

Tradukita de János Ruff